

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 33 Junio 8, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Pezo: Word: 634 KB. Ĝia sveltigita PDF: 354 KB,

- temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkrôcis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

## ILEI denove eldonas librojn

Jen la unua libro eldonita de la nova estraro de ILEI: traduko al Esperanto de la verkoj de la itala kuracisto kaj esperantisto Antonietta Bernardoni, kolektitaj fare de Ermanno Tarracchini kaj de Kolektivo Bernardoni.



Tradukis panjo kaj mi. Edistudio zorgis praktike pri la eldono. Aperis kun Edistudio ankaŭ mia libro en la itala pri la eksperimentoj kun Esperanto kiel facile lernebla kaj propedeŭtika

lingvo. La unua parto de la libro estis la dokumento, kiun mi pretigis por la instrua projekto "30 Oraj Horoj", Dankon al ĉuj, kiuj helpis kaj kunlaboris.

Alessandra Madella



## Bunda kun agado abunda

Bunda gastigis la 6-an Afrikan Kongreson en 2017. Eta urbo, tamen ĝi daŭre plenumas indan laboron. Jen atesto pri tio, mesaĝe al SMG:

'Ni komencis instrui Esperanton ĉe la Esperanta mezlernejo en la vilaĝo Marambeka, la loko kie vi jam vizitis kaj plantis arbon post la Sesa Afrika Kongreso en Bunda. Mi volas sendi kelkajn lernantojn kiuj nun progresas por plia studo. La projekto estas nun sub la gvido de s-ro Mramba Simba, kiu manĝigas min kaj pagas poŝmonon.

David Mapengo, Tanzanio.

## Lerneja jubileo en La Chaux-de-Fonds



Saluton!

Nova jaro, nova vizittago en nia lernejo «La Grande Ourse». Kaj kia vizittago! Nia lernejo festos siajn 40 jarojn da ekzisto!!! Ni kore invitas vin al la 40a Malferma Tago, kiu okazos la 6an de majo 2023. Dum tiu tago atendas vin ne nur ni, sed ankaŭ belaj renkontiĝoj, pedagogia ekspozicio, diversaj programoj en nia lernejo. (Adreso: Recrêtes 18, La Chaux-de-Fonds)

Pro la 40a datreveno, okazos ankaŭ specialaj programoj, kiel ekzemple la oficiala parto je la 11a horo, kiun sekvos aperitivo. Unu el la plej elstaraj momentoj estos la koncerto de niaj gastoj, niaj amikoj Ankie kaj Nanne de Kajto je la 17a horo!!! Ili kantas jam ankaŭ antaŭtagmeze kun la infanoj dum la oficiala parto. Venu multnombre al tiu ĉi speciala okazo! Jam ilia ĉeesto estos speciala, sed ne nur! Mi ne volas ĉion malkovri jam nun, sed mi povas diri al vi, ke ili pasigos kun ni la tutan semajnon antaŭ la malferma tago kaj jam de iom da tempo, ni laboras kune pri iu projekto, kiun ni planas malvaligi kaj prezenti al vi dum tiu ĉi tago! Ĉu ni sukcesos realigi ĝin? Venu kaj malkovru ĝin vi mem! La okazo estos unika kaj laŭ mi tre bela! Valoros veni kaj pasigi kun ni iom da tempo. Ni kore invitas kaj atendas vin!



Inter la programoj okazos ankaŭ nia jara Maratono por subteni nian lernejon. Venu kuraĝigi nin, ĝi komenciĝos je la 15a horo.

Se vi ne scias kial ni kuras nian Maratonon, jen la kialo: ni kuros dum 45 minutoj kaj dank'al niaj helpemaj sponsoroj, ĉiu rondiro alportos iom da mono al nia lernejo, ĉar nia lernejo bezonas tiun financon helpon por povi pluekzisti, plu helpi niajn infanojn kaj plu povi permesi per solidareco, ke ĉiuj infanoj havu la ŝancon frekventi nian lernejon, sendepende de la financa situacio de la familio.

Kaj ankaŭ ĉar por mi tiu ĉi lernejo tre gravas (pro siaj valoroj kaj ankaŭ pro la Esperanto-instruado, kiu estas ene de la normala studprogramo, ne kiel postlerneja, elektebla ŝatokupo), do kiel kutime, ankaŭ mi kuros kun la gelernantoj por nia lernejo. Mi tamen konfesas al vi, ke mi mem malamegas kuri... Mi ŝatas praktiki aliajn sportojn, sed kuri... Do, kial mi kuros? Ĉar mi estas kaj anime, kaj solidare kun niaj gelernantoj kaj kun nia lernejo. Pro tio mi, kiel ankaŭ la lernantoj, mi serĉas miajn subtenantojn sendante tiun ĉi leteron al tiuj kelkaj homoj, kiujn mi konas en Svislando (kaj al kelkaj amikoj eksterlanden). La subtenado povas esti unu konkreta sumo, aŭ sumo/rondiro (1 rondiro estas ĉ. 600m-ojn longa, kaj dum 45 minutoj oni finkuras averaĝe 9-13 girojn).



## La sankta biblioteko survojas al Pollando

Jam estas anoncita ceremonio pri transdono de la Biblioteko Hector Hodler al la Pola Nacia Biblioteko (PNB, Biblioteka Narodowa), kun tuj sekvanta simpozio pri la signifo de tiu mejloŝtona evento. Tio okazis fine de majo.

D-ro Duncan Charters, Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio;  
[uea.prezidanto@aol.com](mailto:uea.prezidanto@aol.com)

Artikolo pri la temo en <uea.facila>:  
<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/transdono-de-biblioteko-hector-hodler-r369/>

## Brazilo ripete Kolektas

Ĉi-semajne la novaĵoj en **Brazila Kolekto** estas tre diversstilaj. Ekzemple, aperis traduko de fama kanto de la pop-roka bando **Skank**, titolita *Jackie Tekila*, tradukita de **Cícero Soares**. Kaj ankaŭ grava komponaĵo de **Milton Nascimento**, titolita *Infana pilko, globeta ludo* (originale *Bola de meia - bola de gude*) tradukita de **Flávio**

**Fonseca.** Krome, **Maia Eurípedes** kreis interesan version por la infana kanto *Eu entrei na roda*, kiu estas akompanata de facilaj akordoj por gitaro kaj partituro. La titolo de ŝia versio estas *Mi parolas, vi parolas*, ĝi estas pri Esperanto, kaj vi povas uzi tiun kanton en klasoj por lernado de la lingvo. Kaj laste sed ne balaste, aperis bela video kantita de **Ana Paula Pose**, de la kanto *Hieraŭ* (originale *Ontem*), de **Daniel Silva**, kaj tradukita de **Said Albuquerque**.



### Brazilo persiste muzikemas

Se vi amas brazilan muzikon en Esperanto, do ĉi tiu servo estas por vi. Ĝi estas kreita por proponi al vi kompletan sperton, kie vi povas esplori kaj ĝui kaj amuziĝi per nia riĉa muziko. Ĉu vi ankoraŭ ne abonis? Ne perdu tempon, aliru nun la jenan paĝon por pli detalaj informoj pri ĉi tiu mirinda abonservo kaj abonu nun: [brazilakolekto.com/](http://brazilakolekto.com/)  
Ĉi-semajne en **Brazila Kolekto** aperis kvar novaĵoj: du videoj (el kiuj unu estas de originala komponaĵo), unu religia kanto kaj unu multoblaĵo, *Estas am' alia afer'*, verkita de **Ĕmerson dos Santos** kaj registrita de la duopo *Dois Eus*. Temas pri tre interesa kanto, moderna, pensiga kaj amuza. Kaj la alia estas de la kanto *Akvoguto* (originale *Gota d'água*), verkita de **Chico Buarque** kaj esperantigita de **Cícero Soares**. La religia kanto estas *Dion mi aŭdas* (originale *Ouço Deus*), verkita de la "kuŝanta giganto" **Jerônimo Mendonça**. Kaj **Vitor Mendes** faris novan tradukon de la kanto *Preciso me encontrar*, verkita de **Candeia** kaj registrita interalie de **Cartola**.

### Junulo deziras korespondi

Mi estas Jolie Bazirake, mi loĝas en Rutshuru, Kongo-Kinŝaso (Kongo DR). Mi estas aĝa 17 jarojn. Mi lernis Esperanton en 2019 kaj mi volas korespondi kun vi por plibonigi mian Esperanton. Kontaktu ŝin: [jolie.baz@gmail.com](mailto:jolie.baz@gmail.com)

Jolie Bazirake

### Fideleco deklamata

Ana Manero deklamas la poemon "Al vi mi malfidelas". La deklamo okazis en tre speciala loko. <https://youtu.be/At8PmXnEWRc>

### Kurso en renomaj polaj urboj

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso "Eraroj ne estas..." - Jagelona Universitato

Gvidantonomo: Maria Majerczak

Tipo: Nova universitata kurso

Loko: Kraków, Pollando.

Aldoninto: Esperant\_Krakow

Krome, la sama gvidanto organizas internacian kurson por ĵurnalistoj. Vidu ĉe:

<https://edukado.net/kursejo?kid=27535>

-----

Titolo: Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj - retaj sesioj

Kategorio: Laste en la movado

Novaĵoj el Poznano pri la Interlingvistikaj Studoj



La tri sesioj de la kvara semestro (en februaro, marto kaj majo) de la postdiplomaj interlingvistikaj studoj okazis plene rete, kio ebligis inviton de gastprelegantoj.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=892>

## La vivo de renoma fotistino

Artikolo pri fotistino Tina Modotti, kiu naskiĝis en Udine, en la sama provinco de Linjano Orsabl, sidejo de la ILEI-Kongreso.

<https://esperanto.cri.cn/2023/05/15/ARTIQ5e6MMRQ5ujTAMtDXmfr230515.shtml>

Alessandra Madella

## Lastaj informoj pri la Kongreso de ILEI

Se vi bezonas karavanon de Torino al Lignano kaj vi ankoraŭ ne mendis ĉe mi, bonvolu fari tuj sendante retmesaĝon. La kosto estas 70 € kaj vi povas pagi ĝin al nia konto ĉe UEA ilek-a aŭ ĉe nia banko indikante "pago por karavano"

Belegajn ekskursojn vi povas tuj mendi. Vi povas spekti videon pri tio ĉi tie:

<https://youtu.be/QNvFmQV6bz0>

Vi povas mendi ekskursojn ĉi tie:

<http://mallonge.net/ekskursoj2023>

Ĉiam vizitu la paĝon de la kongreso <https://2023.kongreso.org>

Estas babilejo en Telegram por ĉiuj aliĝintoj, bonvolu eniri la kanalon por ĉiam havi informojn, novaĵojn, peti informojn, ktp

Laura Brazzabeni, estrarano pri kongresoj

**SMG:** En la Kongreso okazos la Seminario de AMO, numero 102. En ĝi ni rigardos la historion de la Kongresoj de ILEI tra la antaŭaj 15 jaroj.

## Jubilu pri niaj jubileoj

Dum pluraj jaroj la redaktoro de "La Ondo de Esperanto" Aleksander Korĵenkov publikigas listojn de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por ĉiu monato. En la listo por junio 2023 estas, interalie, la juniofina naskiĝdatreveno de Perla Martinelli kaj memordatoj ligitaj kun la forpasintaj aktivuloj: Adam Zamenhof, Duilio Magnani kaj aliaj. Legu: "La Ondo de Esperanto" <https://sezonoj.ru/2023/06/junio-10/>

===== vortoj: 950 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>. La kolekto de EKO legeblas ĉe:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.